Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Aŭstruja Esperanto-Delegitaro (A. E. D.), Esperanto-Delegitaro de Wien (E. D. W.) kaj Universala Esperantista Pacifista Ligo (U. E. P. L.)

2a jaro. No. 5 **Monata** **Majo 1925**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Hovengasse 12, II, 13

Kunlaborantoj! Skribu legeble, retenu kopion, aktualaĵojn sendu ĝis la 1a de l' monato. Manuskriptoj ne resendataj.

Jarabono: Por Aŭstrianoj aŭ. S 3, Germanoj g. or. M 2, Alilandanoj sv. fr. 3.50.

LA PROGRAMO DE RADIO-WIEN (ONDO 530).

Orig.-art. de d-ro G. G. Braun, redakt. de „Radio-Wien".

Depost kiam el nia kulturcentro elektraj ondoj penetras en la eteron, de tag' al tago pligrandiĝas la intereso ankaŭ de la alilanda publiko pri nia programo. Raportoj kaj leteroj el tre diversaj lokoj pruvas tion. Tial certe interesos la diversnacian aŭskultantaron kelkaj linioj pri nia laboro, kiu celas, pli kaj pli inde reprezenti Wien en la aro de l' disaŭdigejoj laŭ ĝia kulturnivelo reprezentota antaŭ la mondo.

Tri specialaj fakoj preparas kiom eble konstante plibonigante la ĉefpartojn de la programo: literatura, muzika kaj scienca.

La literatura prizorgas la prezentadon de teatraĵoj, prelegoj, recitadoj, fabloj kaj laŭbezone enkondukaj paroladoj.

En la monato aprilo la agado de l' „Radio-scenejo" koncernis precipe la preparon por la paskodimanĉa prezentado de la „Faŭst"-dramo de Goethe. Oni provis, peri la ĉefideon de „Faŭst" en unu Radio-vespero: Elektitaj scenoj el ambaŭ partoj de la verko sekvis la faman „prologon en la ĉielo" akompanataj delikate per la muziko de l' Faŭst-sceno de Schumann. Tiu metodo de muzika subteno por la ensentiĝo — jam kelkfoje provita — ankaŭ ĉifoje sin montris tre taŭga. Kiel ĉiam ĉe gravaj prezentadoj parolis unuarangaj artistoj. Pena ja estis la provlaboro, strečiga ankaŭ la vespero mem por prezentantoj kaj aŭskultantoj, sed — vere ĝuiga, do sukcesa.

Daŭrigante la serion de popolteatraĵoj oni enprogramigis „Meineidbauer" (t. e. „La mensogĵurinta kamparano") de Ludwig Anzengruber (p. Ancengruber). La verko „Mutter Sorge" (t. e. „Patrino Zorgo") de Rudolf Hawel (p. Havel) estos ripetata pro multflanka postulo.

Por la 1-a de majo oni preparis „Wilhelm Tell" de Schiller.

En la venonta tempo la „Radioscenejo" prezentos teatraĵojn de Schnitzler, Strindberg, Lenz, Raimund, Calderon k. a.

El la prelegoj posttagmezaj estu menciata la prelegserio „Germana liriko" komencita per poemoj el la XVIIa jarcento. Je la antaŭpaska ĵaŭdo okazis paska prelego (verkoj de Wolfram von Eschenbach, Liliencron k. a.). „Legendoj pri Wien" estis daŭrigataj per „Legendoj pri la turo de St. Stefana katedralo". Je prelegoj en la vesperprogramo de tiu monato estas menciindaj unu pri „Humoro el urb' kaj kamparo", unu „Pri la arbaro kaj ĉasistaj ĝojoj" kaj unu „Nordlanda Vespero". La du lastenomitajn aranĝis la literatura kaj la muzika fako kune.

Kiel ĝis nun ankaŭ en la lasta monato okazis du fabloprelegadoj posemajne. „Fabloj por la etuloj" estis legataj kvin. Novaĵo estis fabloj kun delikata muzikakompano (Hänsel und Gretel, Schneewittchen k a.), kiuj tre plaĉis. Inter la

Prezentado de „Dreimäderlhaus“

supra vico (de maldekstre dekstren): Huber, f-ino Schücketanz. V. Flemming, s-ino Paula Fiedler-Seitz, Otto Langer, Franz Glawatsch, orkestrestro Veit. malsupra vico: s-ino Edith van Aüst, s-ino Gisela Marion, s-ino Wally Langer, Kammersänger Artur Preuß, muzikdirektoro M. W. Ast.

„Fabloj por plenkreskintaj“ notindaj estis du vesperoj: „Pri pluaj sortaĵoj de Bambi“ (bestrakonto) kaj prelego el „Robinson Crusoe“ (okaze la memortago pri la morto de l' aŭtoro Daniel Defoe).

Entute la literatura fako aranĝis 1.—30. aprilo 2 prezentaĵojn de la „Radioscenejo“, 6 recitaĵojn kaj prelegojn, 7 fabloprelegojn, 2 enkondukajn paroladojn. Inter la prezentantoj estis jenaj artistaj steloj: Anton Amon, Heinz Altringen, d-ro Erich Fortner, Lilly Fröhlich, Paul Horn, Viktor Kutschera, Karl Kneidinger, Hans Kainz, Margarete Königswarter-Formes, Lia Landt, Aurel Novotny, Ferdinand Onno, Paul Pranger, Maja Sering, Hilda Wegner, Trude Wessely, Theodor Weiss.

En la monato marto la prezentejo de la sendstacio pro urĝa bezono estis pligrandigata. Precipe la muzika fakestraro nun staris antaŭ la tasko, studi la novajn akustikajn cirkonstancojn kaj eksperimente serĉi la ĝustan lokigon de la prezentontoj kaj sidordon por la orkestranoj. La rezultoj de la lastaj grandaj prezentadoj („Die Schöpfung“ t. e. „La Kreado“ de Haydn, „Zauberflöte“ t. e. „Sorĉfluto“ de Mozart kaj „Carmen“ de Bizet) evidentigis, ke ĉikoncernaj provoj estis farataj ne vane. Fervore laborante kaj kontroligante per eksterstaciaj observ-aŭskultantoj oni estas trovinta nun lokitecon de l' unuopaj instrumentoj, kiu la plensonadon de l' orkestro esprimebligas en plej bona maniero. Ankaŭ la efiko de horoj multe pliboniĝis.

Pri la muzikprogramo mem:

En la paska semajno disaŭdiĝis la edifa oratorio „Die sieben letzten Worte des Erlösers“ t. e. „La sep lastaj vortoj de la Savanto“ de Haydn kaj lia oratorio „Die Schöpfung“ t. e. „La kreado“. Ludis ilin membroj de la orkestro en la ŝtata operejo.

Inter la seriaj verkoj prezentitaj en la lasta tempo la plej rimarkindaj estis la kantaroj „Winterreise“ (t. e. „Vintra vojaĝo“) kaj „Schwanengesang“ (t. e. „Cigna kanto“) de Franz Schubert. Precipe menciata estu la serio „Unu jarcento da serena Wien-a muziko, klariganta parolado kun enmetitaj muzikaĵoj, kiu traktis la ĉefajn reprezentantojn de la mondfama speco „Wien-a serena muziko“. Ĝi ampleksis dekdu vesperojn.

Krom la jam nomitajn operojn oni ludis „Don Juan“ de Mozart, „Margarethe“ (Faust) de Gounod kaj „Der betrogene Kadi“ (t. e. „La trompita kadio“) de Gluck (speciale por Radio-Wien nove studita).

Por la prezentado de la ofte el la publiko postulitaj operetoj oni sukcesis aranĝi ludantaron el konataj scenejartistoj de niaj operetoteatroj. Per tio ebliĝis, prezenti serion da modernaj operetoj kun la originalaj ĉefaktoroj ekz. „Dreimäderlhaus“ (t. e. „La domo kun la tri knabinoj“), opereto traktanta scenojn el la vivo de Franz Schubert, „Auf Befehl der Herzogin“ (t. e. „Laŭ ordono de l'

dukino") kaj „Wiener Blut" (t. e. „Wien-a sango"). Post mallonga tempo sekvos „Hoheit tanzt Walzer" (t. e. „Lia princa moŝto dancas valson"), „Rund um die Liebe" (t. e. „Ĉirkaŭe ĉirkaŭ la amo") kaj „Gräfin Maritza" (t. e. „Grafino Maritza"). Ĉar la akcepto de tiuj operetoj flanke de l' publiko estis tre favora, la unua kaj dua baldaŭ estos ripetataj.

Muziksciencaj paroladoj okazis du: „Gustav Mahler, la homo kaj artisto" de d-ro Paul Stefan kaj „Hugo Wolf" de d-ro Descey. Sekvos unu pri la temo „Kio estas moderna muziko?".

Por prezenti ion ankaŭ al aŭskultantoj malpli altnivele-muziksentemaj, estas enprogramigataj porpopolaj orkestrokoncertoj.

Post la mezo de majo iom post iom oni transiros al la somera programo. En ĝi superos orkestrokoncertoj kaj serena muziko, ĉar unuakaŭze la plej multaj eminentaj dramaktoroj forlasos la urbon, alikaŭze Radio-Wien devos konsideri ankaŭ la dezirojn de la publiko en kuraclokoj kaj somerrestadejoj, kie la homoj preferas gajigaju prezentadojn.

La ĉefaj ĝis nun kunagintaj artistoj de la ŝtata operejo estis s-inoj Elis Schumann, Ella Flesch, Marie Rajdl, A. Achsel-Clemens, Claire Born, Marie Gerhart, la s-roj R. Mayr, H. Gallos, A. Jerger, K. Renner, H. Wiedemann, H. Hofer, J. Manowarda kaj G. Maikl.

*

Forta kredo al la sinklerigemo de nia publiko kaj la klara ekkono, ke unu el la plej noblaj kulturaj taskoj de sendstacio estas la perado de scio kaj klereco, kuraĝigis nin, komenci en novembro 1924 la enprogramigon de prisciencaj paroladoj. Granda sukceso rekompencis la penojn kaj unutempe la postulado pri tiaj paroladoj estas tiel ĝenerala, ke tiu ĉi programbranĉo urĝigas konstante plian ampleksigon. Oni paroligas nur homojn, kiuj estas en sia specialkampo rekonitaj gvidantoj, kaj atingas per tio unuflanke, ke la publiko ricevu efektive aŭtoritate garantiitan materialon, aliflanke intiman kontakton kaj senperan konatecon inter la popolo kaj ĝiaj spiritaj eminentuloj. Antaŭe oni devis timi, ke la intenco, aranĝi nur tiajn aŭtoritatajn referatojn, ne estos realigebla pro la konata mondfremdeco kaj neemo al publikeco ĉe multaj niaj scienculoj. Boŭsance tiu timo estis neprava: Ne unu ĝis nun rifuzis.

Ĉefa principo por la sciencdisaŭdigo estas: absoluta sentendenceco. Ĉiu paroloonto ĝis nun volonte sin submetis al ĉikoncerna nepre necesa laŭtakta cenzuro transdonante antaŭe manuskripton kaj konsentante aferecajn dezirojn pri ŝanĝoj necesaj laŭ la menciita principo. Libera parolado ne estas permesata. Tiu principo kaŭzas nur unu ja tre bedaŭrindan sed neeviteblan malavantaĝon: la eligon de personoj ludantaj gravan rolon en la politika vivo. Same netoleritaj estas temoj pri politikaj, religiaj aŭ seksaj problemoj, plue paroladoj pri aferoj science dubaj aŭ interesantaj nur malgrandan aron.

Prezentado de „Wilhelm Tell"

starantaj de maldekstre dekstren: orkestrestro R. Fanta, A. V. Blum, Aurel Novotny, F. Onno, Anna Kainz-Schrötter, P. Horn, d-ro P. C. Tyndall, Arpad Kramer, H. Kainz, R. Ferstl, sidantaj: Lilly Fröhlich, P. Pranger, Trude Wessely, reĝisoro d-ro H. Nüchtern, Th. Weiß, Luise Liebstöckl, K. Kneidinger.

Alilandanojn interesos, ke oni regule paroligas gvidantojn de niaj gravaj sciencaj institutoj, grandaj industrioj, publikaj laborejoj ktp., por prezenti al la publiko klaran bildon pri ties laboroj kaj efektivigoj.

Kelkaj prelegtitoloj el pasintaj monatoj ilustru la sciencan programon de Radio-Wien: „Z. R. III.“ (d-ro Eckener, la gvidinto de l' Zeppelinveturilo al Ameriko; 28. II.); „La virino estante patrino“ (s-ino Marianne Hainisch, la patrino de la liglanda prezidanto de Aŭstrio, 5. III.); „Unua helpo ĉe sufokdanĝero (7. III.), ĉe veneniĝoj (12. III.), ĉe vundoj (19. III.), ĉe sangado“ (14 IV.) d-ro Lamberg, ĉefkuracisto ĉe la savsocieto-Wien); „Konsilado pri profesielekto“ (sekcia ĉefo d-ro Kaŭer; 14. III.); „La fonogramarkivo de la Akademio por sciencoj en Wien“ (d-ro Hayek; 17. III.); „La novaj monsistemoj en la naciaj ŝtatoj“ (docento d-ro Kerschagl; 24. III.): „La teknika provaranĝaro en Aŭstrio“ (prezidanto Exner; 26. III.); „Samtempaj dokumentoj el la historio de Wien“ (prof. Stagl; 6. IV.); „La akvoprovizado de Wien“ (ĉefa konstrukonsil. Schönbrunner; 10. IV.); „La kanto pri la Nibelungoj“ (prof. Kralik); „La franca ekspozicio de Sezession“ (d-ro Ottmann; 16. IV.); „Superheterodyn-riceviloj“ (prof. d-ro Schwaiger, 18. IV.); „El la vivo de l' abelreĝino“ (doc. d-ro Muck; 23. IV.); „La graveco de la higiena ekspozicio en Wien 1925“ (sekc. ĉefo d-ro K. Helly); „Instruo pri rigardado de pentroartaĵoj (univ. prof. d-ro M. Eisler, 28. IV.).

Ankaŭ lingvoj estas instruataj per Radio-Wien. La 2. III. komencis prof. Mac Callum sian anglan kurson majstre faratan. Post vigla konkuro inter itala, franca kaj Esperanta lingvoj la laste nomita estis ekinstruata ankoraŭ en la nuna sezono pro ĝia relative malgrandaj malfacilajoj. (Hofrat Hartwich gvid.) La enkonduko de Esperanto estis ankaŭ necesa tial, ĉar oni internacie interkonsentis pri ĝi kiel Radio-lingvo, ĉiuj statioj jam paroligas E-kursojn kaj Wien ĉiafere ne povis ne agi same. La aliajn lingvojn oni ekinstruos en aŭtuno.

Kompreneble la lingvo germana ne estu forgesata pro la aliaj. Por kulturado de nia gepatra lingvo servu grandstila serio da prelegoj pri la tuta germana literaturo, kiun efektivigos fakuloj. Krome paroladoj pri lingvaj erarkutimoj k. s. akrigu la prilingvan senton.

Mi esperas, esti montrinta per supraj malmultaj linioj, ke la entrepreno Radio-Wien ne ŝparas kostojn kaj laboron por povi al sia aŭskultantaro prezenti indan programon. esper. *W. Smital*-Wien.

La klišojn afable disponigis al ni „Radio-Wien“, I., Schottenring, kaj „Radioamateur“, IX., Severing.

„Ĝis Reaŭdo! Bonan nokton! Bonan nokton!

El la oficiala gazeto „Esperanto“ Genève.

La Unua Internacia Kongreso de Radio-Amatoroj adoptis Esperanton kiel internacian helplingvon en radio-interkomunikado

SALZBURG, LA URBO DE LA V-a TUTAŬSTRIA ESPERANTO-KONGRESO.

Ĉe la rando de mole ondiĝanta ebenajo krute suprenstaras montoj. Vespere la neĝkovrataj Alpoj tie ruĝiĝas pro adiaŭkisoj de la suno, kiu ne facile disigante sin de ilia imponanta aspekto, prokrastas sian subiron malantaŭ la senfina bavara ebeno. Kiel infanoj de ambaŭ kuŝas intermeze fabele belaj montetoj, inter kiuj traserpentumas murmurante la ĉiam juna rivera Salzach. Lagetoj kaj marĉetoj, arbaretoj kaj herbejetoj varie vestas tiun ĉi beletan randon inter severaj montoj kaj milda ebenaĵo; ornomas ĝin ankaŭ multspecaj floroj, kaj prikantas tiun ĉarman natur-belecon per ravaj melodioj la gaja birdaro, kiu hejmsente tie nestas kaj restas. Do ne mirinde, ke ankaŭ natur- kaj muzikamantaj homoj tie jam de antikva tempo emis ekloĝi, kiuj klopodis ornami la de bona Dio kreatan ejon per harmoniaj artaĵoj homaj. Tiel estiĝis Salzburg, urbo de gastamo kaj artemo, kaj harmonio super kontrasto estas la sekreto de ĝia aparta ĉarmo. Per tio ĝi estas parenca kun la granda ideo de nia majstro Zamenhof: frateco malgraŭ diverseco de opinioj, internacia lingvo kaj sento malgraŭ amo al la gepatra lingvo kaj patrujo. Se vi dubas, rigardu nur la de ĉiuj flankoj videblan kastelon Hohensalzburg, kiel ĝi burĝonas kvazaŭ giganta kristalo el kegla monteto kovrita de verda arbet-



aĵo! Ĉu tia aspekto ne mildigas nian juĝon pri la fereco de la mezepoko, montrante al ni pruvon de ĝia energia artemo? Ĉirkaŭe kvazaŭ apogas sin diversaj fieraj turoj, disetendas sin palacoj kaj placoj, diversepokaj konstruaĵoj, promenvojoj kaj ĝardenoj. Ĉu tio ne respegulas la montaran kaj ebenaĵan karakteron de la ĉirkaŭanta naturo aŭ la seriozecon kaj gajemon de la enloĝantaro? Zorge konservi la rememoraĵojn el pasintaj epokoj kaj ĝoje kunvivi la nunan kulturon, kaj montri al gastoj kun

afabla fiero la belan hejmon, tio estas karakterizaj trajtoj de vera Salzburg'ano. Ĉiun eblan diferencon fine superregas la harmonio de la tradicia muziko. Sed mi ne volas skribi gvidlibron*), do mi nur diras: tia estos nia kongresurbo en venonta aŭgusto. Kiu ĝin jam konas, tiu volonte venos refoje, kiu ne konas ĝin, tiu venu kaj li konvinkiĝos, ke estas agrable, esti en Salzburg.

F. Christanell,
A. E. D.-Landestro de Salzburg.

*) Gvidlibro de Salzburg (komp. No. 1 de „A. E.“) havebla ĉe la grupo Salzburg.

STATA EKZAMENA KOMISIONO POR ESPERANTO EN AŬSTRIO.

La urba lernejkonsilantaro por Wien unnanime akceptis la proponon de landlernejinspektoro Hofrat d-ro Franz Wollmann, proponi al la ministerio por instruaferoj, instali ekzamenkomisionon por E. pri instrukapablo por mezlernejoj kaj pri scio de E.

La ministerio nun instalis laŭ tiu propono tiun ĉi ekzamenkomisionon kaj eldonis ekzamenregularon.

En aŭtuno la unuaj ekzamenoj okazos.

Regularo
por la ekzameno pri instrukapablo je la mondhelplingvo „Esperanto“ por instruo en mezlernejoj kaj por la ekzameno je kontrolo pri scio de Esp.

I. Generalaj reguloj.

§ 1. Estas instalata speciala ekzamenkomisiono. La direktoro kaj la aliaj membroj de la komisiono estas eknomataj de la ministerio por instruaferoj je la daŭro de tri jaroj.

§ 2. La ekzamenkomisionoj estas senpere sub la ministerio por instruaferoj. Je la fino de la trijara funkciodaŭro la direktoro de la ekzamenkomisiono devas prezenti al la ministerio por instruaferoj resuman raporton pri la laboro de la komisiono kaj pri la okazigitaj ekzamenoj kun listo de la ekzamenitoj aldoninte la fincenzurojn.

§ 3. La ekzamenoj okazas regule dufoje en ĉiu jaro kaj tiu pri instrukapablo aparte de tiu pri la kontrolo pri nura scio. La ekzamenoj estas publikaj.

§ 4. La petskriboj pri partoprenpermeso por la ekzamenoj estas prezentotaj ĉe la direkcio de la ekzamenkomisiono plej malfrue kvar semajnojn antaŭ la publikigita ekzamenkomenco. La ekzamenoto citu en la petskribo, ĉu li deziras akiri atreston pri instrukapablo aŭ nur pri scio de Esperanto.

1. Al la petskribo pri partoprenpermeso por la ekzameno pri instrukapablo estas aldonotaj: a) bapt- aŭ naskiĝatesto; b) abiturienta atesto de meza lernejo (knabina liceo), instruist(in)a faklernejo, ŝtata metia lernejo (pli-altrangaj metia kaj faka-lernejo) kaj abiturienta- aŭ fina atesto de komerca akademio. De tiuj ĉi postuloj nur la ministerio por instruo povas fari esceptojn laŭ propono de la ekzamena komisiono.

2. Al la petskribo pro ricevo de atesto pri scipovo de Esp. estas aldonotaj: a) Laŭ bapt- aŭ naskiĝatesto necesa pruvo de la atingita 17. vivjaro; b) fina atesto pri la sukcese partoprenita tria klaso de burĝlernejo aŭ la pruvo pri konoj almenaŭ egalaj al tiu klerecgrado.

§ 5. La ekzamenoj okazas sub la prezido de la direktoro de l' ekzamena komisiono aŭ de komisionano de li nomita kiel anstataŭanto en ĉeesto de almenaŭ du fakekzamenantoj por E. Pri la ekzameno de ĉiu ekzamenato protokolo estas farota. La cenzurnotoj el la unuopaj partekzamenoj kaj la tuta rezulto estas fiksataj je la fino de la ekzameno en komisionkunsido per decido de la plimulto. Je egalnombro de voĉoj decidas la prezidanto.

§ 6. La rezultoj el la apartaj partekzamenoj (§ 11, 12) estas kvalifikataj per „bonege“, „bone“, „kontentige“ kaj „ne kontentige“. La ekzamenito ricevinta en ĉiuj apartaj ekzamenoj kaj laŭ instruprovo almenaŭ la cenzurnoton „kontentige“ estas deklarata „kapabla“. Ricevinte en neniu aparta ekzameno malpli bonan noton ol „bone“ kaj en la plimulto de ili „bonege“ li estas „kapabla kun distingo“.

§ 7. La atesto skribota post la ekzameno estas subskribota de la direktoro kaj unu komisionano.

§ 8. En okazo de malbona ekzamenrezulto la komisiono decidas, ĉu la ekzamenito povas esti allasata post duona aŭ nur post unu jaro al ripeto de la ekzameno. Ĉe ripeto la ekzameno estas farota en ĝia tuta amplekso. La ripeto de la ekzameno regule nur unufoje estas permesata, pli oftan ripetadon nur la ministerio mem povas laŭ propono de komisiono permesi.

§ 9. Temas pri la ekzamenkostoj. kiuj estas 10 ŝ (§ 4, p. 1) kaj 5 ŝ (§ 4, p. 2) kaj estas pagotaj unu semajnon antaŭ komenco de la ekzamenoj ĉe la prezidanto kaj en neniu okazo estos repagataj.

§ 10. Kopio de skriba atesto nur povas esti farata laŭ permeso de la ministerio por instruaferoj. Por tio estas pagota krom la laŭleĝaj stampomarkoj la duona ekzamenkosto.

II. Ekzameno pri instrukapablo en Esperanto.

§ 11. La ekzameno dividiĝas en skriban kaj buŝan kaj instruprovon.

1. La skriba ekzameno konsistas el: a) traduko de prezentita aŭ diktita malfacila E.-teksto en la instrulingvon; b) E.-laboraĵo pri prezentita temo aŭ traduko el la instrulingvo en E.-on. Uzado de vortaro estas ne permesata; c) laborаĵo pri pedagogia-didaktika temo.

2. La buŝa ekzameno ampleksas: a) Legadon kaj klarigon de prezentita E.-teksto; b) ĝisfundan konon de la vortaro kaj gramatiko, speciale de la vortformado en E.-o; c) scion pri la historia evoluo de la mondhelplingva problemo, de historio, institucioj kaj literaturo de E.; d) la pedagogiajn-didaktikajn scipovojn necesajn por lingva instruado. La instruprovo okazas en publika lernejo. La pritraktota temo estas konigata al la ekzamenoto unu tagon antaŭe. De la instruprovo kaj apartaj ekzamenoj sub 1 c kaj 2 d tiuj ekzamenatoj estas liberigataj, kiuj posedas atestoп pri instrukapablo por publikaj lernejoj.

III. Ekzameno por pruvi la scipovon de Esperanto.

§ 12. Ankaŭ tiu ĉi ekzameno dividiĝas en skriban kaj buŝan. Ĉe la skriba ekzameno estas postulata: a) Traduko de prezentita aŭ diktita E.-teksto en la interkomunikiĝlingvon; b) E.-laborаĵo pri prezentita temo aŭ traduko el la interkomunikiĝlingvo en E.-on. Uzado de vortaro estas ne permesata. Ĉe la buŝa ekzameno estas postulata: a) Legado kaj klarigo de prezentita E.-teksto; b) interparolo en E.-o pri temo el la ĉiutaga vivo.

§ 13. Tiu ĉi ekzamenregularo tuj ekfunkcias.

* * *

Ni ne publikigis la tutan regularon. Tiu ĉi estas havebla ĉe „Volkserziehung“ t. e. „Popoledukado“, Wien I. Schwarz nbergstr. 5.

LA KOMISIONO POR ŜTATOJ EKZAMENOJ POR ESPERANTO EN AŬSTRIO.

La aŭstria ministerio por instruaferoj eknomis la jenajn komisionanojn:

direktoro: Hofrat d-ro Franz Wollmann, landa lernejinspektoro kaj urba lernejkonsilantarano;

anoj: d-ro Hugo Jockl, profesoro; s-ro Adolf Macho, eksestro de faklernejo; s-ro P. Franz Meštan, provincialo; s-ro Josef Schamanek, eksestro de burĝlernejo kaj lektoro por Esperanto ĉe la teknika altlernejo; s-ro Joh. Schröder, redaktoro; s-ro Otto Simon, profesoro.

ĈU NI BEZONAS ANKORAŬ NOVAN LERNOLIBRON?

Ĉu ni ne jam havas tro da lerniloj? Ĉu estas eble, pravigi aperon de nova? Jam ekzistas Esperanto-lernolibroj laŭ modernaj metodoj, kiuj vere superas la malnovajn. Sed la fakto, ke tre multaj kursanoj, komence fervoraj, forlasas baldaŭ la kurson aŭ eĉ fidelaj ĝis la fino forlasas nian movadon, la fakto, ke Esperanton deziras eklerni izoluloj. kiuj ne povas viziti kurson pro diversaj kaŭzoj, la fakto, ke finlernintoj ne kuraĝas ekparoli samideanon alinacian, ĉar li nur lernis el sia lernolibro frazojn ne taŭgajn, ne praktikajn, kaj ne scias esencon kaj utilon de nia movado, jam uzebla por multaj rilatoj, — tiaj kaj ankaŭ aliaj faktoj dezirindigas novan lernolibron!

Multaj el vi jam konas la plej modernan metodon porlingvan „Mertner“. Ĝi celas lernigi la lernemulojn laŭ principoj psikologie ĝustaj. Ĝi ne enuigas per instruo de multaj gramatikaĵoj, ne lacigas per amaso da vortoj, sen interrilatiĝo natura parkere ellernotaj, ĝi prezentas jam komence, tuj komence, tekstojn el gazetoj tre diverstemaj, tekstojn el artikoloj interesaj, poste novelojn, eĉ romanon kaj teatraĵojn, el kiuj oni kvazaŭ ludante, ĉiam interesate, kune kun la enhavo de la tekstoj iom post iom, pli kaj pli ensorbas vortaron kaj gramatikon. La lernanto laŭtlegas nur la tekston fremdlingvan, samtempe legante per siaj okuloj la vortojn en

sia gepatra lingvo, kiuj, unu post unu, ne laŭfraze, sed laŭvorte, tradukas la vortojn de la lingvo lernata. Oftaj ripetoj de la sama vorto, ne tuj unu post la alia, sed post temperoj psikologie necesaj, igas neforgesebla tiun vorton, kaj tiam ĝi ne plu estas tradukata, sed jam tuj komprenata kiel vorto de la gepatra lingvo! Ciferetoj post ĉiu vorto fremdlingva, ne jam tiamaniere „lernita", interrilatas kun la tradukanta vortaro apuda.

Ne estas eble ĉi loke klarigi detale la metodon, la multegajn malfacilajojn, kiujn la verkanto devas superi, la laboron, kiun kaŭzas la ofta registrado de la vortoj ripetitaj, la tre malfacila elekto de la teksto laŭ enhavo kaj gramatika kaj stila taŭgecoj ktp, ne estas eble ĉi loke skribi pri la neceseco, ŝanĝe adapti tiun metodon por Esperanto lernilo pro la facileco kaj strukturo de nia lingvo, pro la fakto, ke tiu ja ne estas lingvo nacia, sed lingvo en specialaj cirkonstancoj uzinda, lingvo, kies esencon kaj utilon ja multaj ne ankoraŭ komprenas. Tamen bonvolu ekkompreni la gravecon, eĉ nepran necesecon de entrepreno, verki kaj eldoni tian lernolibron por nia lingvo! Ne nur plifaciligus tiu metodo la lernadon de nia lingvo, ja tre facila, sed ĝi kreus efektive verajn adeptojn, kiuj scias la gravajojn de nia movado, de nia literaturo, de nia gazetaro. Ili interesiĝus pri nia afero, scius, kiamaniere ĝin utiligi, kuraĝus aboni kaj legi gazetojn, verkojn, kuraĝus veturi al kongreso, ne timante, ke ili aŭdos paroladojn, kies vortojn ili ĝis nun ne ankoraŭ „lernis" el sia libro! Ili pliserioziĝus, legante — en la lernolibro mem — pri fakmovadoj ilin interesantaj kaj vere fervoriĝus por Esperanto — lernante!

Tia lernolibro — eble pli multekosta ol kelkaj aliaj — entenus krom la gramatiko kaj vortaro, kvazaŭ malgrandan resumon pri tiuj sciindajoj, kvazaŭ komencon de privata biblioteketo!

Se vi kredas, gesamideanoj, ke tiu verko estas subteninda, tuj bonvolu skribi al „Gesellschaft zur Verbreitung zeitgemäßer Sprachmethoden" (societo por disvastigi modernajn metodojn porlingvajn), München, Bavariaring 10, kiu jam promesis eldoni tiun verkon, kiun laboras kaj parte jam pretigis la subskribinto; sed ĝi ankoraŭ hezitas, baldaŭ ĝin eldoni kaj dubas pro financaj motivoj. Por ke la verko ne estu malmoderna antaŭ sia apero, kaj treege baldaŭ helpu nian venkon, petu la societon, ke ĝi ne hezitu! Faru laŭ via bontrovo kaj subtenu per tio

d-ron Leo Blaas, Rattenberg, Tirolo!

LA ESENCA CELO DE L' SCIENCO.

Orig. aritik por „A. E." de Walter Smital-Wien okaze la „Higiena Ekspozicio Wien 1925".

Aŭdante la vorton „scienco" la homoj kutime pensas pri io nebula, pri sekaj matematikaj formuloj, pri aparatoj nekompreneblaj, pri obstinaj mondofremdaj blankbarbuloj, kiuj meditas pri pli malpli nenecesaj problemoj. Ke la ĉefa tasko de l' scienco estas, esplori la eterne ŝanĝiĝantan naturon laŭ giaj elementaj fortoj kaj disponigi la ekkonojn pri ties reciprokfunkciado al la homaro, por ke la vivo praktika povu esti plibonigata kaj plibeligata, — pri tiu esenca celo de l' scienco nur malmultaj plenkonscias. Kaj tamen: Se validas la vorto „Nur bona homo povas esti bona kuracisto aŭ bona instruisto", ĝi ne malpli validas pri sciencisto ĝenerale. (Ĉar, ĉu la socio ĉefe por tio nutras aregon da sciencistoj, ke ili elpensu amasmortigajn venengasojn?)

Kun ĝojo kaj dankemo mi memoras la multajn belajn horojn, kiam mi havis la honoron, labori kun nobla altanima scienculo en hemia laborejo. Mi tiam partoprenis porinstruistan faklernejon en Wien kaj s-ro profesoro d-ro Siegfried Wiechowski instruis nin pri ĥemio. Li estis ne nur entuziasma instruisto sed ankaŭ komprenema edukanto kun malofta vasta horizonto.

Jen li venis je bela posttagmezo en la laborejon, ekprenis kreton antaŭ la granda nigra tabulo dirante: „Atentu,

kara amiko! Ĉu vi scias, kio kaŝiĝas malantaŭ jenaj ĥemiaj formuloj? —:
A) $CaCo_3 + 2HCl = CaCl_2 + H_2O + Co_2$;
B) $CaCl_2 + Na_2Co_3 = CaCo_3 + 2NaCl$.“

Longa silento. Antaŭe ni estis laborintaj kun tre komplikaj grandaj formuloj, — mi ne tuj komprenis, kion li celis.

„La formulo estas tre simpla ‚sinjor‘ profesoro, . . .“ mi respondis.

„Sed ĝia praktika efektivigo, mia kara,“ li daŭrigis, „povus helpi al la solvo de grava socia problemo“.

„— —??“

„Jes, de l’ popolsaneco. Se ni nur sukcesos, elfaligi el la solvaĵo A) la karbonikan kalcion en formo de rombosistemaj kristaloj ne tro malgrandaj.“

„Kaj kion ‚sinjor‘ profesoro, vi intencas fari per la kristaloj de tiu artefarita aragonito?“

„Purigi la dentojn.“

Klakega ridado.

„Kial vi ridas tiel malsaĝe? Ĉu vi ne scias, kara Smital, ke sanaj dentoj estas nepre necesaj por sana resti kaj bonfarti . . .“

„Jes, jes; sed ekzistas ja multego da dentpurigaĵoj, pastoj, pulvoroj . . .“

„Sed ne idealaj laŭ sciencaj principoj. Aŭskultu min!“

Mi aŭskultis ekkomprenante jam.

„En ĉiuj viaj preparatoj estas karbonika kalcio la frotpuriganta konsistero. Sed ricevita el grandaj pecoj per muelado aŭ ĥemie, sed — pro neĝustaj elfaligcirkonstancoj — kun akraj randoj de la eroj, la produkto gratante difektas la dentemajlon. Krome la ŝmiriĝemaj pastoj ŝtopas la interdentspacoin, tiujn danĝerajn nestejojn de baciloj. Ĉu do la scienco ne grave servus al la homoj, disponigante al ili malkontinuajn globformajn kristalojn, kiuj eniĝus inter la dentojn purigante r u l a n t e ankaŭ tie, kien la broso ne enpenetras? Vi scias, ke aragonito havas la malmolecgradon tri . . .“

„. . . estas do pli mola ol la dentemajlo, ne gratus ĝin. Mi ĉion komprenas. Sed, kiel produkti la kristalojn?“

Kalkulado pri enhavokvantoj de l’ solvaĵoj, provado de temperaturoj ktp. ktp. sekvis. — Tio estis 1913.

Dum jaroj mi nenion aŭdis pri la „rulantaj kristaloj“.

En la grandioza Higiena Ekspozicio antaŭ kelkaj tagoj mi renkontis — lin.

„Jen — Eŭodont, la praktika rezulto de obstina jarlonga eksperimentlaboro, karulo! Rekonita de fakaj aŭtoritatuloj, sola uzata kaj rekomendata en 217 dentistejoj de Wien.“ Mi gratulis.

„Jen — Om, kies receptou ni dankas al la plej lastatempaj elfosadoj en Hindujo. Papiruso rakontas al ni, kiel la antikvuloj sub la ardega hinda suno sciis freŝigi sian korpon per bonodorantaj s o l i d a j substancoj. — Pardonu, mi nun devas rapidi. Venu iam al mi, por trinki teon. Mi rakontos al vi pri tiuj antikvaj misteroj.“ —

Longe mi staris meditante antaŭ la malgrandaj intensekoloraj ostoglataj ujoj, kiuj enhavis ebriigan sekreton el antikva tempo. Mi pensis pri ĝia retrovinto, kiu per modernaj hemirimedoj revekis ĝin, por plibeligi la vivon de siaj mizeriĝintaj homfratoj — epigonoj rilate al vivobelaĵoj. (Daŭrigota.)

EISENSTADT — ĈEFURBO DE „BURGENLAND“ T. E. „LANDO DE L’ KASTELOJ“.

En la teritorio „Burgenland“, kiu per popolvoĉdonado estis aligata al Aŭstrio, tri urboj, nome Eisenstadt, Mattersburg kaj Sauerbrunn aspiregis estiĝi ĉefurbo.

Nun la landa deputitaro decidis por Eisenstadt.

Eisenstadt estas ne nur la plej granda urbo, sed posedas ankaŭ gravan kulturan pasintecon. Tie Josef H a y d n pasigis grandparton de sia vivo kaj verkis siajn multajn simfoniojn, mesojn kaj intimajn kordmuzikaĵojn. Tie naskiĝis unu el la plej famaj profesoroj de la Wien-a universitato, la anatomo Josef Hyrtl.

En Eisenstadt ankaŭ estas la bela „Wolf“-muzeo, kiu donas resumon pri la kultura evoluo de la lando de la prahistoria kaj romana tempoj ĝis la nuna.

DATREVENFESTO DE L' POŜTMARKOJ EN AŬSTRIO.

Anglujo estis la unua lando, kie la poŝtmarko estis enkondukita (1840).

Dek jarojn poste tiu ĉi poŝtoteknika novaĵo enradikiĝis en nia lando. (1. junio 1850.)

La 1. junio 1925 estos grava memortago ne nur por la aŭstriaj filatelistoj sed ankaŭ por la aŭstriaj poŝtadministracio kaj ŝtata presejo.

Por festi solene tiun ĉi okazaĵon la poŝtregistaro aranĝos en la lasta semajno de majo „memorekspozicion". Oni ekspozicios la trezorojn je aŭstriaj poŝtmarkoj el la poŝtmuzeo. Krom provopresoj, klišoj ktp. oni vidos ankaŭ kelkajn unikaĵojn el la posedo de la poŝtadministracio.

Jubileajn poŝtmarkojn eldoni oni ne intencas, sed nur novajn markojn laŭ la nova monsistemo, nome:

Afrankaj pm. je 1, 2, 3, 5, 6, 7, 8, 10, 15, 16, 18, 20, 24, 30, 40, 45, 50 kaj 80 groŝoj, 1 kaj 2 Ŝilingoj.

Punafrankaj pm. je 1, 2, 4, 6, 8, 10. 12, 15, 20, 23, 30, 40 kaj 60 gr, 1 Ŝil.

La novaj aerpoŝtmarkoj estos eldonataj iom poste pro ne ĝusta preteco.

„HÄFERLGUCKER" IAMAJ KAJ NUNAJ.

La nomigo „Häferlgucker" estiĝis dum regado de duko Heinrich el la gento de Babenberger. Tiam la „Schotten"-monahoj, nomitaj Hyberner, ricevis la permeson, preni siajn manĝaĵojn el la kortega kuirejo.

Dum oni alportis la manĝaĵojn al la monahoj, multaj rigardantoj ĉeestis. Scivoleme ili informis sin pri la speco kaj kvanto de la manĝaĵoj. Kelkfoje ili ankaŭ levis la kovrilon kaj rigardis la enhavon de la potoj.

Tiel la Wien-anoj ĉiutage sciiĝis per tiuj 'personoj („Häferlgucker"), kion ilia duko estis manĝanta.

Por forigi tiun observadon la duko havigis al la monahoj enspezojn, por ke ili povu de nun mem prepari siajn nutraĵojn.

Tiamaniere estiĝis la poste fama kuirlernejo de la „Schotten"-monahoj.

Kontrolon en la kuirejo mastrino ne ŝatas, ĉar tiu ejo estas ŝia aparta teritorio. Edzon, kiu tamen traflaras la kuirejon kaj rigardas en la potojn, Wien-anino ankoraŭ nuntempe nomas „Häferlgucker".

„Häferlgucker" t. e. homo, kiu kontrolas la enhavon de la potoj antaŭ la pretigo de la manĝaĵoj.

JUBILEO DE „HAGENBUND" T. E. „HAGEN"-LIGO.

El la „Unuiĝo de belartistoj" eliĝinte la artistligo „Hagen" starigis por si la programon servi al la modernula arto. Tial la junularo, inter ili Schiele, Kokoschka, Wiegele, Kolig, Faistauer kaj Franz Hofer trovis tie aktivan helpon por sia celado.

La interrilatoj kun artistoj ekster Wien kaj ankaŭ Aŭstrio estis ĉiam tre viglaj.

Nun „Hagenbund" sub gvidado de sia nuna prezidanto skulptisto Karl Stemolak festas la jubileon de sia 25 jara ekzisto kaj de sia 50. ekspozicio.

20% apartenas al vi!

Ĉiuj societoj kaj unuopuloj sentu la moralan devon, akiri al „A. E." minimume po unu anoncon por ebligi ekzistadon kaj laŭeble pliampleksigon.

Unu paĝo kostas 35 Ŝ., duono 18 Ŝ., kvarono 9·5 Ŝ., okono 5 Ŝ.; por trifoja aperigo malpliiĝas la kostoj je 5%.

La anoncoj estos tradukataj de ni senkoste. La monon sendu kun mendo kaj teksto al ni.

Por garantii la daŭrigon de E.-sendaĵoj el la radiostacio Hamburg, ondo 395, kie nia L. K. Minor parolas kurson, vi estas petataj esprimi — nur mallonge — per poŝtkarto ĉi koncernan deziron al Norag, Hamburg.

Averto.

S-ro Kurt Klaps, iama vicdel. de UEA en Danzig, vojaĝadas tra la mondo ŝajne sen mono kaj trovas la delegitojn de UEA ankaŭ dumnokte, por peti helpon, por ke li povu daŭrigi la migradon al parencoj, kiuj estas sufiĉe malproksimaj kaj certe tuj repagos la sumon al li pruntitan. Li subskribas ŝuldatestojn, proponas sian valizon kiel kaŭcion ktp. Al mi li promenis la repagon per sia onklo Josef Gabler komercisto, Wien, I., Radetzkystr. 10, plej malfrue ĝis 16. IV. 1925. Nek venis mono nek respondo al mia letero sendita al tiu onklo. Do, estu singardaj, delegitoj de UEA!

D-ro *Adolf Halbedl*, del. UEA, Graz.

Aŭstruja Esperanto-Delegitaro

Protokolo pri la A. E. D.-konferenco en St. Pölten 9. majo 1925 koncerninta la fondon de landestraro por Niederösterreich.

Ĉeestas: A. E. D. prezid., A. E. D.-ĝen. sekr. delegitoj el Korneuburg (Altrichter), Krems (s-ino Heidinger), Liesing (D-ro Scholz), Marktl (Biehler), St. Pölten (Goldmann, Lachmann, Pfeiffer); gasto-el Wien (Klein). **Skriban konsenton** sendis Hainburg kaj Klosterneuburg. **Elektita landestraro**: s-oj Goldmann Anton, Rennbahnstraße 31, landestro; Lachmann Hans, Klostergasse 9, anstataŭanto; Pfeiffer Walter, Lederergasse 10, sekretario; ĉiuj en St. Pölten. Grupestro de „Nova Sento" en St. Pölten raportas, ke la grupo interkonsente kun A. E. D.-Direktantaro, kiu delegis s-on Smital al St. Pölten, priparolis kun vicurbestro Peer kaj distrikt-lernejinpektoro Handl la necesajn paŝojn por enkonduki E.-on en la tieajn lernejojn. Oni instigis la grupon al petskribo kiel bazo por la urbkonsilantara pritraktado kaj financa aranĝo de la afero.

Graz: Okazis 17. kaj 21. aprilo ekzameno en la polica kurso (15 partopr.); ĉiuj sukcesis. La komisio konsistis el pol. centr. insp. Görger, pol. insp. Kocker, kursestro Hallamayer, landestro por Stirio kolonelo Hackl, prez. de la loka grupo Rogler. Centr. insp. Gröger promesis pro la bona sukceso novan kurson en aŭtuno.

En Groß-Raming (ĉe Steyr) kurson gvidas instr-ino Cipera.

Eo-Societo „Nova Sento" en St. Pölten aranĝis ĉefkunvenon 9. majo n. j, bone vizitatan. Ĉeestis ankaŭ gegastoj el Korneuburg, Krems, Liesing, Marktl kaj Wien. Novelektita estraro: Lachmann Hans (estro), Goldmann Anton (anstataŭanto), Bernhard Karl, Brandstetter Mizzi, Fasching Anton, Getzinger Franz, Langegger Karl, Oberndorfer Poldi, Pfeiffer Walter, Seidl Richard, Zapletal Franz kaj Zöchling Marie. La societo fondita en septembro 1923 nombras nun 65 anojn. Depost ĝia fondo estis aranĝitaj: ekspozicio, Nikolofesto, Zamenhofmemorfesto ktp., ĉiuj bone vizitataj kiel signo, ke ankaŭ la loĝantaro de St. Pölten favoras la movadon.

Dum la ĉefkunveno la grupestro kun dankvortoj transdonis al s-ro Hugo Steiner, ĝen. sekr. de A. E. D., pro liaj klopodoj por la societo (li instigis kaj fondis la grupon, ktp.) kaj al vicgrupestro Anton Goldmann, pro lia senlaca kaj sukcesplena gvidado de E.-kursoj en St. Pölten.

Vespere je la oka komencis amuzvespero en Ober-Wagram (15 min. de St. Pölten). Tien la partoprenintoj de la ĉefkuno marŝis kun granda standardo tra la urbo St. Pölten.

Ĉeestis la amuzvesperon pli ol 300 personoj, kiuj tiel amuziĝis, ke noktmeze je la fino de la belege prezentita programo ili ne volis forlasi la teatrosalonegon. Poste kunvenis en diversaj kafejoj la amuzemaj gesamideanoj por aŭdi muzikon de muzikistinaro.

Steyr. S-ro Lidl gvidis kursojn por policistoj kaj real-, burĝ-, fak- kaj komerclernantoj kaj komencas nun propagandvojaĝon tra Supra Aŭstrio, Salzburg, Tirolio al la XVII a.

Propaganda Ekskurso al „Wachau".

La gesamideanoj el Wien, Korneuburg, Klosterneuburg forveturos la 6. junio je la 22. horo per ŝipo al Melk. Tien venos la ges-anoj el St. Pölten. Postemigrado, parte per fervojo al Krems, de kie reveturo je la 18. horo. Gesamideanoj venu multnombre!

Esperanto-Delegitaro de Wien

Wien, XXI, Am Spitz 14.

La turistunuiĝo **„La Naturamikoj"**, grupo Leopoldstadt aranĝis en sia ejo II. Taborstraße 46a (kafejo) la 7. majo 1925 lumbildparoladon „De Gardasee ĝis Romo" en Esperanto de s-ro Čech, germanigita de s-ro Feith. Poste propagandparolado. 200 ĉeestantoj. Elektita komitato priparolis fondon de Esp-sekcio de Turista societo „La Naturamikoj". Interesuloj sin turnu al Alfred Klein, Wien II, Pazmanitengasse 10/21.

Kurso en la Universitato, gvid. d-ro Pfeffer, anoncis sin 60 pers.

Esp. Soc. Danubio. VII., Lerchenfelderstr. 23. La 11an majo parolis d-ro Pfeffer pri: „La suna homo kiel celo de savanta edukado.“

E.-societo „Junularo“, III., Radetzkystraße 25, kafejo Molkereihof aranĝos paroladojn 28. V. s-ino Steffi Müller, 4. VI. s-ro Georg Lempert el Riga, 18. VI. s-ro R. Cech, 25. VI. s-ro Ad. Warkány.

Unua Esperanto-Unuiĝo en Wien I, Weihburggasse 12 (Kasino). Parolis 8. V. f-ino Irene Rusch, 15. V. d-ro E. Sós; parolos 22. V. s-ro Fr. Braun „Rakonto pri kontrabandistoj“, 29. V. s-ino Steffi Müller „Orientaj fabeloj“.

Wien-a Akad. E. Unuiĝo. La 11an majo parolis F. W. Illing: „La unuaj tagoj de E.“

RADIO
BICIKLOJ KAJ
KUDROMAŜINOJ
PICK-WIEN
Centra magaz.: IX, Liechtensteinstr. 27
Filioj: IV, Wiedner Hauptstraße 10 kaj
VI, Gumpendorferstraße 67.
Oni parolas Esperante!

Calderón
La Urbestro de Zalamea
Dramo en 3 aktoj. Tradukita de Enrique Legrand.
Prezo por Aŭstrianoj: Ŝil. 2·60.
Aĉetebla ĉe:
Emil Schade, Wien, VI., Mollardgasse 55-II.

Legu la artikolon „La esenca celo de l'scienco“ sur pĝ. 52!

EUODONT-OM

Oni korespondas per Esperanto.

Adresse: Wien I, Helferstorferstr. 4, Schottenhof, IX. Stiege, Tür 2.

Eldonanto: Esperanto Unuiĝo en Korneuburg (Redaktoro: Hugo Steiner, Korneuburg, Hovengasse 12). — Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III. Steingasse 25.